

## AVENO #46 - Verdaj Partioj & Esperanto - 2020

Gravaj dokumentoj, pri verdaj rezultoj, okazajhoj, rilato inter la Verdaj Partioj kaj Esperanto

Estus bone se samideanoj el diversaj landoj sendu la raportojn pri siaj Verdaj Partioj. Mi petas pardonon, ke la elekto estas iom hazarda, kaj chefe temas pri Europo.

Se vi estas membro de verda movado (en senco de Verdaj Partioj) kaj ghis nun ne estas membro de AVE bonvolu sendi ret-mesaghon al la sekretario de AVE: [AVE@verduloj.org](mailto:AVE@verduloj.org)

Gravas scii kiom ni estas.

= = = =

2020-11-30 David Healey ighis urbestro en Dublin-Fingal

David Healy, esperantisto kaj membro de la Verda Partio, de duonjaro estas urbestro de Fingal, unu el la kvar municipoj kiuj konsistigas Dublino. Li diras al **Libera Folio**, ke li bonvenigas sugestojn pri tio, kiel li povus helpi al la movado. Gratulon !

= =

2020-10 Verduloj en Rusio kaj Litovio

Bedaurinde en Litovio la rezulto de la kunfandita partio Kamparanoj kaj Verduloj perdis la registaron, kiu nun estas che la konservativuloj. Tamen atingis la duan rangon kaj bonan rezulton (17%).

Mi ne komprenas la verdajn partiojn en Rusio.

Jabloko, la verda frakcio, fondita de Alexaj Jablokov (elstara ekologisto en Rusio, kiu mortis 2017) <http://rus-green.ru>, kunlaboras kun la europaj verduloj (Europeangreens.eu) sed faris la lastan informon sur la retejo je 2018.

La alia evidente tre aktivas, ricevis kelkajn seghojn okaze de la regionaj balotoj en Septembro, sed mi ne tiom facile legas & komprenas la rusan, por eltrovi kiu estas malantau tiu partio. Eble iu el niaj rusaj geamikoj povas informi min. <http://greenparty.ru>

= =

2020-06-30 Gratulon al la Verduloj en Francio

Vochdonantoj sendis multajn Verdulojn al la seghoj de grandaj urboj: Strasburgo, Besancon, Lyon, Marseille. Anne Hidalgo (Socialistoj) restis chef-urbestrino de Parizo, shi delonge sekvas politikon favore al ekologio, bona aero, biciklado.

Dank' al tio la prezidento Macron rimarkis ke ekologio kaj klimato-protekto estas gravaj temoj.

Kontraste al la germana verda partio en Francio estas vigla komisiono pri lingvaj rajtoj kaj Esperanto. Sur la paghoj de ilia Esperanto-Komisiono ekzemple trovighas „Respondo de Europaj Verduloj pri la kronviroza krizo“ en Esperanto: [www.esperanto.eelv.fr/kovim-19krizo/](http://www.esperanto.eelv.fr/kovim-19krizo/)

= =

2020-06-12 AVE che virtuala Konsilio de Europaj Verdaj Partioj (5 taga)

estis la unua tia virtuala prezentado – je Vendredo ni partoprenis okaze de malferma okazajho „Restart Europe“.

AVE prezentis 5 dokumentojn - „Evoluo de Esperanto en Esperanto kaj en la franca“ de Mirejo; "36 Years: Green Parties & Esperanto (AVE)"; „Europa Himno“ de U. Brocatelli; kaj finfine la videon de Judith pri la denaskuloj.

Mi uzis „babili“ (chat) por kontakti 8 personojn 4 respondis ke ili rigardis nian prezentajhon: Victor Cavaco, Verdpertia reprezentanto el Portugalio, konatulo el Germanio, krome 2 membroj de FYEG (la europa junularo de la verdaj partioj), kiuj "vizitis kaj komentis" - unu rememoris pri siaj geavoj kiuj estis esperantistoj, krome Mina Tolu de FYEG petis min traduki "**Be Brave - Green Europe**" do mi provis "**Estu brava - verdigu Europon !**" - ah, eble devus esti "estu brave"

Mi ne scias chu ili saltis al nia pli moderna retejo: [Verdularo.Wordpress.com](http://Verdularo.Wordpress.com), pri kiu subtenis min Claude Rouget.

Do, valoris montri ke Esperanto ekzistas kaj junas. La ekspozicio estis videbla ghis la fino. Fakte estis nur 2 Asocioj ekstere de la partia sistemo: AVE kaj [EuropeanMovement.eu](http://EuropeanMovement.eu).

Sam-tage estis 2 „kunsidoj“ (la unua (pri Global Greens kaj Corona) malbone funkciis teknike).

Je la dua agadis tre gravaj prelegantoj pri "Visions for a resilient future" (vizioj por rezistokapabla estonteco)

Vandana Shiva - enkondukis. Amy Tyler pri sendependaj medioj (kontraŭ Fake news de politikistoj).

Illaria Capua - pri malsanoj el la fauno (zoonotic diseases) ekzemple pro la forhakado de pluvarbaroj.

Bill McKibben (ekologisto) - 350.org – ilia celo estas redukti CO2 en la atmosfero ghis 350 ppm – sekura koncentriteco. Dum la lastaj 400.000 jaroj tiu valoro estis neniam pli alta ol 280, kreskis nur dum la lastaj 100 jaroj ghis 410 ppm, mezurita sur monto Mauna Loa, Havajo.

= =

2020-02-10 Gratulon al la Verduloj en Irlando

ili ricevis - 7,9% pli multajn vochojn ol kutime kaj nun ili havas ch. 12 seghoj en la parlamento.

Eble Kristoforo povas klarigi pri kiuj temoj ili parolis dum la balot-kampanjo.

--

2019-10 sukceso de Verduloj en Pollando

En la nova Sejm (parlamento) de Pollando la unuan fojon estis elektitaj 3 junaj verdpartianoj:

Tomasz Anisko, Malgorzata Tracz (Vroclavo) kaj Ursula Zielinska (Varsovio).

AVE gratulas kaj deziras bonan laboron en malfacila politika chirkauajho.

(dankon al Edward Wojtakowski kiu metis chi-tiun informon en Fejzbukon (kie mi ne estas membro) )

Tamen pluraj skribas tie en la grupo: Monda Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE)

<https://www.facebook.com/groups/162562750423305/>

Jen la retejo de la pola verda partio (en la pola kun bazaj informoj en la angla):

<https://partiazieloni.pl/en/>

= = =

2020-05 Malmoe (Svedio), Asembleo de FYEG – Europaj Junaj Verduloj

la preciza dato ankoraŭ mankas. Eble iuj samideanoj emas partopreni kaj montri ke esperantisto (r) estas akktivaj. Indas rememori la salutvortojn de Amanda Lind je la UK-Lahti.

--

2019-09-27 Klimataj manifestacioj tutmonde – inkluzive de Belarus

tie sidis manifestaciante juna verdpartianino Veronica; sole char organizi manifestacion estas pli

malfacile ol en aliaj europaj landoj. Sur la retejo FYEG.org vi trovas multajn informojn – bedaurinde nur en la angla :(

Jen la mesagho pri Belarus: [www.fyeg.org/news/no-action-too-small-story-brave-single-striker](http://www.fyeg.org/news/no-action-too-small-story-brave-single-striker)

---

2019-12-24 Chernobil (1986) - ankoraŭ detruas la sanon – atomenergio ne taugas

Aro Velmet el Estonio serchis la spurojn de radioaktiva malpurigo (kontaminado) kaj trovis ke

individuoj pli realisme monitoras ol la mezuriloj. En intervjuo li rakontis kial: Estas la homoj kiuj en-

korpigis la radioaktivajn izotopojn, kaj ili montras la rilatajn malsanojn – plejparte estas malsanetoj,

sed pluraj diversaj kiuj reduktas la sanon. Aparte la kancerroj de tiroida glando ighis pli oftaj. Oni

provis enterigi radioaktivan rubon chirkau Chernobil kaj aliloke, sed parte la radioaktivaj izotopoj

revenas, tra fungoj au okaze de brulantaj arboj. Pro la longdaureco intertempe estas pluraj adiciantaj

poluantoj: prov-eksplozoj de atombomboj, regulaj (permesataj) eligoj de radioaktivaj izotopoj (tra la

kamentubetoj de atomreaktoroj), eligoj de la prilabor-firmaoj. Fukushima kaj Majak-Kyshtym /Uralo

kauzis kaj kausas aliajn gravajn okazajhojn.

Diskuto temas ankau pri lobiistoj kiuj volas reaktivigi atomreaktorojn, kaj argumentas ke ili ne eligas

CO2-on. Fakte oni eligas multon da CO2 ghis oni havas la brul-materialon, oni konstruas la

reaktoron, oni devas rekonstrui ghin kaj zorgi eterne pri la rdoaktiva rubo. Finfine – uzi la

regajneblajn energiojn surloke estas la daurigebla solvo – kaj la shparema uzado de ernergio.

La jhurnalo de la Europaj Verdaj Partioj prezentas la artikolojn en 22 diversajn artikolojn, sed kutime la artikoloj estas nur en 1 lingvo.

[www.greeneuropeanjournal.eu/the-secret-history-of-radiation/](http://www.greeneuropeanjournal.eu/the-secret-history-of-radiation/)

-- fino --